# komunikoj

JARO 37-a | JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO | N-ro 147 2012

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

## LORENZ KAJ FEB LABORANTE KUNE!

Preskaŭ mil gesamideanoj partoprenis la 97-an Universalan Kongreson de Esperanto, okazinta en Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio. La teamo de Lorenz kaj Brazila Spiritisma Federacio, ĉiam laborante kune, de la 28-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto, partoprenis la Movadan Foiron, kie ekspoziciis spiritismajn librojn, disdonis flugfoliojn kun informoj pri Spiritismo kaj ankaŭ nian trimonatan bultenon "Komunikoj". Krom tio, pli ol 30 geamikoj, el pluraj landoj, aŭdis la prelegon de Elmir dos Santos Lima pri "Materia kaj Morala Karitato". Post la prelego, la prezidando de nia Eldonejo, Robinson Mattos, donacis spiritismajn librojn al ĉiuj ĉeestintoj. Ĉe la fino de la kunveno, ĉiuj kantis la belan muzikon "Multa Lum", kaj tuj post Robinson preĝis kaj finis la kunsidon.

Ĝis Islando!




La teamo de Lorenz kaj BSF kun eksterlandaj gefratoj. Notinde estas la ĉeesto de nia ege kara Frato Trevor Stelle antaŭ la komputilo. Elkoran dankon al ĉiuj!




Laŭ informoj de Paulo Carvalho, la brazila Esperanto Grupo L. L. Zamenhof, la 9-an de Septembro/2012 okazigis sian 11-an Spiritistan Esperantistan Renkontiĝon, kiam 60 gesamideanoj ĉeestis por aŭdi la prelegon de la junulo Alvaro Motta pri la temo "140 Jaroj de la Naskig'o de Francisco Waldomiro Lorenz". Post la prelego okazis la tradicia "Arta Momento", kiam la violonisto Luiz Carlos Barbiere ludis klasikajn kaj popolajn muzikojn; kvin gelernantoj de la Grupo Zamenhof deklamis, dulingve, la poemon "Esperanto", de Castro Alves, psikografiita de la mediumo Francisco Cândido Xavier; Margareth kaj Benedito, gelernantoj de la Grupo Zamenhof, aktoris, dulingve, en la skeĉo "Li Rezignis", de Bertram Potts, kaj ankaŭ kvin lernantintoj de la Grupo Claude Pirron, kantis "Avinan Rep", de Allan Argolo. Por fini la eventon, ĉiuj kantis la esperantan himnon.

Se vi volos aliajn detalojn pri la teksto kaj la Grupo L. L. Zamenhof, skribu al

contato@lazaroluizzamenhof.com.br

## SENPAGA LIBRO

**ALMANAKO LORENZ** estas la senpaga libro de ĉi trimestro por niaj karaj eksterlandaj samideanoj; tamen, brazilanoj kiuj ĝin deziras sendi ankaŭ al alilandaj samideanoj, skribu al ni kaj, kun granda ĝojo, ni ĝin sendos al vi, ankaŭ senpage!




**ALMANAKO LORENZ** estas la unika en la esperantismo. Ĝi pritraktas ĉiuj temojn, kiuj interesas la modernan homon laŭ la spirita vidpunkto kaj ĝi ampleksas vastan kampon de la filozofio, de la scienco kaj de religio.

Jen, kara leganto, se vi volos koni aliajn detalojn pri la temo, petu vian senpagan ekzempleron kaj kun granda ĝojo ni tuj ĝin sendos al vi.

eldonejo_lorenz@uol.com.br
Skajpo: Lorenz editora • Facebook: Editora Lorenz

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO KAJ SPIRITSMO

En la 68-a IJK (Internacia Junulara Kongreso), en Hanojo, la junuloj Alvaro Motta kaj Fernando Maia organizis diskut-rondon pri la temo "Kio estas Spiritismo?". Ĉirkaŭ 15 personoj, el 12 landoj, partoprenis la kunsidon: Belgio, Ĉinio, Svislando, Rusio, Italio, Vietnamio kaj aliaj.



Dum la aktivaĵo, ĉiu partoprenintо ricevis broŝuron pri "La Libro de la Spiritoj" kaj aliajn informilojn. Ĉe la fino de la kunsido okazis lotumado de spiritismaj libroj.

Se vi volos partopreni en la proksima IJK de tiu ege nobla laboro, skribu al

**alvaromotta@gmail.com** aŭ

**editora_lorenz@uol.com.br**





## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

Al Majnov, 5.XII. 1899, Ĥerson

Estimata amiko! - La ĵurnalo estas tro malgranda por povi enpreni rakontojn aŭ dramojn, kaj tial s-ro Schmidt kredeble ne povos presi la "Manfredon". Krom tio mi pensas ke la verkon de la granda princo estus pli bone eldoni en versoj. Se vi povus sendi al mi la originalon, mi povus en libera tempo traduki ĝin per pene prilaboritaj blankaj versoj, kaj eble tio ĉi plaĉus al la princo kaj movus lin ion fari por nia afero.

P.S. Ĉu vi ne povas skiribi al mi la plenan adreson de la grafo Tolstoj, ĉar mi volus skribi al li leteron.

L.Z-f

1889 - Al Sinjoro D-g en M.

Vi povas egale bone diri "la malfeliĉo faris lin prudentan" kaj "la malfeliĉo faris lin prudenta"; mi mem uzas en tia okazo la nominativon. La uzado de ch etc. anstataŭ ĉ etc. estas enkondukita nur por la presejoj kiuj ne havas ankoraŭ literojn kun signetoj, sed en skribado mi konsilas al Vi ĉiam uzi pli bone ĉ anstataŭ ch, ĉar la uzado de unu litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de du literoj. Vi diras, ke la signetoj superliteraj estas maloportunaj en la skribado; sed la alfabeto pure latina havas ja ankaŭ kelkajn literojn kun signetoj superliniaj (i, j, t), kaj la plej granda parto de la lingvo kiuj uzas la alfabeton latinan havas amason da aliaj literoj kun signetoj superliniaj kaj subliniaj. Certe ia akademio aŭ kongreso penos iam elpensi pli oportunajn skribajn formojn por kelkaj literoj (ĉar ne sole la literoj kun signetoj sed ankaŭ multaj aliaj literoj havas formon tre maloportunan); sed tio ĉi estas jam tute alia demando, kiu la lingvo mem tute ne tuŝas: ĝi estas ne demando de lingvo, sed nur demando de oportuneco de la skribado.

L. Z-f.

### *Al amikoj de Lorenz*

Estimata ano de Lorenz, ni petas komplezon: kiam vi deponos la pagon de la jarkotizo al nia Eldonejo, bonvolu nin sciigi, ĉar multaj same tion faras kaj ni ne sukcesas identigi de kiu estas la depono.

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, estas la horo; se vi ankoraŭ ne aliĝis, petu vian aliĝilon kaj helpu nin por la disvastigo de Spiritismo tra la tuta mondo, kaj sciu kion vi ricevos en la komforto de via hejmo.



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE F. V. LORENZ

Al sr° Ismael Gomes Braga, RIO.
Tre estimata Samideano kaj Frato:

Korajn salutojn al Vi kaj al Via ŝatinda Familio.

Dum la du lastaj semajnoj mi ne ricevis Vian korespondaĵon. Antaŭ sep tagoj mi sendis al Vi mian leteron kaj la 45 paĝojn de Via traduko. En la pasintaj tagoj mi trovis tempon por komenci mian tradukon de la "Libro de la Spiritoj", kaj ĉikune mi sendas la du unuajn daktilografitajn paĝojn. Kie mi faris ruĝan vertkalan linion, devas la presisto uzi malgrandajn tipojn.

En la "Oiriginala Verkaro" de Zamenhof mi trovis, sur la 77a paĝo, n° 23, noteton pri mi; kie mi konsilis ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu apostrofon returnitan post la litero; ekz. Ac'eti. — Tiam mi estis 18 jara, kaj estis jam aperinta mia lernilo de Esp° por ĉeĥoj.

La prigrandan parton de la Orig. Verk. mi ja konas, ne el tiu libro, sed el la diversaj presaĵoj, kiujn mi estis leginta (sed, bedaŭrinde, ne konservis). Post kelkaj semajnoj mi retrosendos al Vi tiun libron, post relegi ĝin plene.

Estas 13ª horo, kaj mi devas fini, ĉar jam venis iuj vizitantoj.


Pra la tradukado de la angla poezio: ĝis hodiaŭ mi ne trovis la necesan inspiron. Sed iam ĝi venos.

Mia Marta foriros el mia domo, por iu tempo, ĉar ŝi devas esti instruistino familia en iu domo de kamparo. Mia bofilo jam ŝanĝis sian loĝejon.

Dezirante al Vi kaj al la Viaj ĉion bonan,
mi estas Via sincera amiko kaj samideano.

**Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la Teron.**

**JESUO**




## LANĈO

Eksterlandaj gefratoj, se vi interesiĝos pri la temo, skribu al ni kaj, kun granda ĝojo, ni vin sciigos detalojn pri tiu bela verko de la brazila verkisto Richard Simonetti, nun en Esperanto. Ni vin pliatentigas, ke ĉi-verko, en la portugala lingvo, jam estas en la 4-a eldono kaj vendiĝis pli ol 230.000 ekzempleroj.

Tel.: (21) **2221-2269** / **2452-9223**
editora_lorenz@uol.com.br

**FINALMENTE, A PRINCIPAL OBRA DE RICHARD SIMONETTI, AGORA EM ESPERANTO!**

Em língua portuguesa, este livro já atingiu a 42ª edição, sendo vendido mais de 230.000 exemplares. De forma simples e agradável, o autor dismistifica a morte à luz da Doutrina Espírita.

A Editora Lorenz conclama a todos os espíritas esperantistas para participarem desta empreitada de divulgação de tão bela obra, principalmente aos irmãos de outras terras. Peça já o seu exemplar e ajude-nos a levar luzes para todos os cantos do planeta.

## FLORIANÓPOLIS HAVAS ESPERANTAN-KLUBON



Kiam oni festis en la 26-a de Julio 2012 la 125-an datrevenon de oficiala komenc-punkto de la lingvo Esperanto, estis kreita ESPERANTO-KLUBO DE FLORIANÓPOLIS, en la ĉefurbo de la Ŝtato Sankta Katarino, Brazilo.

Ĉeestis dek-naŭ homoj: instruistoj, lernantoj de Esperanto kaj familianoj, kiuj kunvenis en frata etoso por doni al la Esperanto-Movado novan ilon por la disvastigado de la internacia lingvo Esperanto.

La ĉeestantoj elektis la unuan Estraron de ESPERANTO-KLUBO DE FLORIANÓPOLIS:

- Prezidanto: ANTONIO FELIX DA SILVA;
- Vic-Prezidanto: JOSÉ SARTORI CHAVES BURGER;
- Sekretariino: MARTHA OLIVEIRA RIBAS;
- Kasistino: SENILDE BRAGA GURJÃO;
- Direktoro de Komunikado: NILTON CÉSAR GÓES:
- Direktorino de Komuna Propaĵo: MÍRIAM JUSTINO;
- Konsilantaro: AIRTON JOSÉ DE FARIA, SIMONE SILVA DOS SANTOS e ANTÔNIO DE PÁDUA MELLO MOREIRA DE SOUZA.


Antonio Felix da Silva
Representante BEL em Santa Catarina
VD e FD UEA em Florianópolis

LORENZ

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Rua Francisco Vale, 57,
Engenheiro Leal
21370-171 – Rio de Janeiro (RJ)
Brasil – Brazilo

# WILLIAM CROOKES



Naskiĝo: Londono, Anglio, la 17an de junio 1832. Elkarniĝo: Londono, Anglio, la 4an de aprilo 1919.

**SCIENCA AGADO**

Estante 20-jaraĝa li publikigis interesan studon pri la polarizita lumo. En 1885, nur 23-jara, oni akceptis lin kiel membron de la Londona Reĝa Societo, kiu siatempe kunigis la plej famajn sciencistojn en la mondo.

Li inventis modernan sistemon por purigi oron. Li malkrovis la elementon Talion kaj perfekte priskribis ĝiajn ecojn.

En 1879 li elmontris la 4an materio-staton, kiun li nomis "radianta materio", kaj poste fariĝis laŭreato de la Franca Akademio de Sciencoj.

Li inventis la radiometron. Li malkovris la katodajn radiojn. Li faris aliajn gravajn servojn al la Fiziko kaj Kemio, pro kiuj li ricevis la reĝan ormedalon kaj la titolon"SIR".

**SPIRITISMA AGADO**



En 1870 li deklaris sur "Quartely Journal of Science", ke li esploros la spiritajn fenomenojn.

Per la mediumeco de Florence Cook, 15-jara gimnazianino, li materiigis la spiriton Katie King dum 3 sinsekvaj jaroj.

Li esploris kaj pruvis – pere de plej rigoraj procedoj – la jenajn fenomenojn pruvantajn la senmortecon de la animo: movon de pezaj aĵoj; lumajn aperaĵojn; rektan skribon; transcendan fotadon; levitacio; tiptologion, parafinan multadon sen homa kontakto.

**SPIRITISTA KONFESO**

Dum sia parolado en 1898 ĉe la Kogreso de Brita Asocio li deklaris: "Nenion mi reprenas koncerne tiujn esplorojn, kaj mi konfirmas miajn jam publikigitajn asertojn, kaj mi eĉ povas multon aldoni al ili"

La granda saĝulo asertis – kiel aperas en la verko "No Invisível" (Ĉe la Nevideblo), de Léon Denis: **"Spiritismo estas science elpruvita".**

Kiam la malamikoj de la Nova Fido strebis por konfuzigi la publikon pri li, li mem diris: **"Sed mi ne diris, ke tiuj fenomenoj eblas; mi diris kaj rediras, ke ili estas veraj".**

